

Rakontoj de Liĉjo

(Ne nepre feliĉaj)

Unua Volumo

Vi rajtas adapti kaj redakti la jenajn rakontojn laŭplaĉe. Simple aldonu la atribumon "Originale Verkita de Liĉjo MILLER".

You may adapt and edit the following stories however you wish. Simply add the credit "Originale Verkita de Liĉjo MILLER".

Enhavo

<u>Paĝo</u>	<u>Rakonto</u>
3	<i>Venigu la Kapforhakiston</i>
4	<i>Dinosaŭroj</i>
5	<i>La Kelo</i>
7	<i>Persistemo</i>
8	<i>Kantado</i>
10	<i>La Vojaĝo</i>
12	<i>Kiel Servi Homojn</i>
13	<i>Kiel Solvi Problemojn</i>
14	<i>La Reĝino en la Alta Turo</i>
15	<i>Orharulino: La Vera Rakonto</i>
16	<i>Kio Okazis pri la Drakoj</i>
17	<i>Freŝaj Piroj</i>
18	<i>Matena Gasto</i>
19	<i>La Tragika Rakonto pri Sam kaj Tim</i>
20	<i>La Postmorta Esperanto</i>
21	<i>La Geko</i>
22	<i>Infanoj, ignoru viajn gepatrojn kiam ili diras "Manĝu la legomojn"</i>
24	<i>Ekstertera Gasto</i>
26	<i>Mia Patro</i>
28	<i>Amrakonto</i>
29	<i>Moderna Amrakonto, kun Poŝtelefonoj</i>

Venigu la Kapforhakiston

Iam, antaŭ multaj jaroj, en la malnovaj tempoj, la Reĝo de malgranda regno trovis sin malgaja kaj en malbona humoro.

“Venigu la minstrelojn!” li ordonis. Kaj la minstreloj venis antaŭ lin, kaj ludis siajn liutojn, kaj kantis siajn kantojn. Sed tiun tagon la voĉoj ne estis tiel bonaj, kelkaj kordoj de la liutoj rompiĝis, kaj meze de la dua kanto la solisto tute forgesis la vortojn. La Reĝo ne estis feliĉa.

“Venigu la kapforhakiston”, li ordonis, kaj la sekvan tagon en la gazeto estis notico ke la Reĝo serĉas novajn minstrelojn.

En tiu sekva tago la Reĝo restis malgaja kaj en malbona humoro.

“Venigu la ĵonglistojn!” li ordonis. Kaj la ĵonglistoj venis antaŭ lin, kun siaj pilkoj kaj keglaj kaj stangoj. Sed tiun tagon ili ne vere lertis: ili lasis fali la pilkojn sur la plankon, unu el la keglaj preskaŭ frapis Lian Reĝan Moŝton je la vango, kaj kiam unu el la ĵonglistoj provis ĵongli kvin pilkojn samtempe li tuj perdis ĉiujn. La Reĝo ne estis feliĉa.

“Venigu la kapforhakiston”, li ordonis, kaj la sekvan tagon en la gazeto estis notico ke la Reĝo serĉas novajn ĵonglistojn.

En tiu sekva tago la Reĝo estis eĉ pli malgaja, kaj en eĉ pli malbona humoro. “Venigu la klaŭnon”, li ordonis. Kaj la klaŭno venis antaŭ lin . . . sed tiun tagon la klaŭno suferis pro malvarmumo, kaj vere povis fari nenion krom snufi, terni, tusi, larmi, kaj forigi mukon el la nazo. LA REĜO NE ESTIS FELIĈA!

“Venigu la kapforhakiston”, li ordonis. “Kaj venigu la Reĝajn Purigistojn, kaj voku la Reĝan Kuraciston. Aĉ!” Kaj la sekvan tagon en la gazeto estis notico ke la Reĝo serĉas novan klaŭnon.

En tiu sekva tago la Reĝo ne sciis kion fari. Li estis malgaja. Li estis en malbona humoro. “Mi ne scias kion fari!” diris la Reĝo. “Venigu la . . . venigu la . . . nu, venigu la Esperantistojn!”

La Reĝaj Konsilistoj iom skuis la kapon, sed ili iris en la vilaĝojn kaj urbetojn kaj kunvokis la Esperantistojn de la regno. “Vi estas urĝe bezonataj ĉe Lia Reĝa Moŝto!” ili anoncis.

Baldaŭ komencis aperi en la Reĝa Kortego amaso de Esperantistoj. Ĉiuj portis grandajn verdajn stelojn, brile verdajn flagojn, vortarojn, vortaregojn, lernolibrojn, gramatikojn, multajn novajn poemojn, kaj literaturon tradukitan el ĉiuj lingvoj de la mondo. Kaj ili ekkantis en Esperanto, “Esperanto, estas la lingvo por ni, por ni, Esperanto, estas la lingvo por ni . . .” kaj poste ili ekkantis “Estis foje Ĉapo Verda, la la, bona knabo, multe lerta, la la” kaj poste ili tuj serioziĝis kaj ekkantis “En la mondon venas nova sento . . .”

La Reĝo estis unue ŝokita. Poste li ĉirkaŭrigardis kaj miris. Kaj aperis granda rideto sur la Reĝa Vizaĝo, la unuan fojon en multaj tagoj. Kaj la Reĝo mem kuniĝis al la grupo kaj ekkantis kun ili, brak-en-brake, “Diligenta novlernanto De la lingvo Esperanto, la, la.”

Kaj la sekvan tagon aperis notico en la gazeto ke la Reĝo ja serĉas novajn Esperantistojn.

Dinosaŭroj

Iam estis knabo kiu treege timis dinosaŭrojn.

“Ne estas dinosaŭroj nuntempe en nia mondo”, pacience diris Panjo kaj Paĉjo.

“Vi ne povas esti tute certaj”, respondis la knabo.

“Vidu, en nia ĝardeno troviĝas eĉ ne unu eta dinosaŭro”, pacience diris Panjo kaj Paĉjo.

“Vi ne kontrolis en ĉiu ĝardeno en la mondo”, respondis la knabo.

“En la bestoĝardenoj neniam oni vidas dinosaŭrojn”, pacience diris Panjo kaj Paĉjo.

“Ŝajnas ke la bestoĝardenoj estas koruptitaj”, respondis la knabo.

Kaj tiel plu.

La gepatroj aranĝis vizitojn por la knabo ĉe kuracistoj, neŭrologoj, psikiatroj, psikologoj, konsilistoj, teologoj, frenologoj, kaj eĉ paleontologoj . . . sed ĉiam la knabo insistis ke la granduloj ne vere certas, kaj ne vere scias, kaj tial li daŭre timis dinosaŭrojn.

Ĝenerale pro sia timo la knabo ludis en la domo. Sed iun tagon la suno brilis, la vento plaĉe blovis, kaj malgraŭ la malemo li iris eksteren en la familian ĝardenon.

Kaj tie estis dinosaŭro.

. . .

“Imagu”, diris Panjo kaj Paĉjo. “Nia kara filo ĉiam estis prava.”

La Kelo

Sub nia lernejo estas kelo. El ekstere, oni povas vidi la duon-fenestrojn. Iam estis vitro, sed nun ilin kovras farbitaj lignaj tabuloj. Interne, estas ŝtuparo kiu iras suben, sed fine de ĝi estas granda ligna pordo, dika, pez-aspekta, kun granda ŝtala seruro . . . kaj al la kelo la pordo restas ĉiam ŝlosita. KREDU MIN. Mi ĝin provis plurfoje. Kiel same faris mia fratino. Ĉiam sen ia ajn movo aŭ eta malfermiĝo.

Nia lernejo estas tre malnova. Nia Avo estis lerneĵano tie, kaj mi kredas ke ankaŭ lia patro vizitis la samajn klasĉambrojn. Avĉjo ĉiam diras al ni, "Pri la kelo sub la lernejo, ne zorgu. Tie estas nenio. Kaj mi avertas, ke vi neniam provu malfermi la pordon." Kiam ni demandas al li "Kial ne?" li simple minacas per la okuloj kaj skuas la kapon.

Ni unufoje demandis al Paĉjo, kiu same kiel ni vizitis la lernejon. Sed li diris "Kial vi demandas? Mi ne scias ion ajn pri kelo. Efektive mi ne sciis ke estas kelo." Nia Paĉjo estas kontisto ĉe granda firmao, ĉiam portas kravaton, kaj neniam malobeas regulon. "Ĉu Avĉjo neniam avertis vin pri la kelo?" ni demandis. "Nu, se li avertis min, mi certe faris tion, kion li diris, sed mi vere ne memoras." Al nia Paĉjo tute mankas aventuremo.

lun sabaton, tamen, posttagmeze, mi kaj mia fratino biciklis preter la lernejon, kaj mi rigardis kaj vidis ke la ĉefpordo de la enirejo staris duonmalfermita. Nekutime. Tute nekutime, ĉar en la lernejo estas neniu semajnfine. Mi fajfis al la fratino, montris per mano, kaj ni lasis la biciklojn sub arbo kaj malrapide paŝis al la pordo . . . kaj enen.

Estis strange, vidi la senlumajn koridorojn, sen homoj kaj sen bruo. Jen mia klasĉambro, fermita kaj ŝlosita. Jen la manĝejo, tute malplena. Jen la oficejo, sen deĵorantoj. Ni du leĝere paŝis antaŭen, plena de miro kaj certe timo. Jen la biblioteko . . . jen la ŝtuparo al la kelo, kies pordo ĉiam estas firme ŝlos- . . . Sed atendu. Lumo. Mallaŭta bruo. Kaj je kaŝrigardo, la granda dika peza ligna pordo staras malŝlosita, malfermita.

Mi rondokule rigardis mian fratinnon, kaj ŝi min. Sed ni silente interkonsentis, kapjesis senvoĉe, kaj paŝon post paŝo malsupreniris ĝis la pordo . . . ni glitis tra la pordon, kaj trovis nin en koridoro kun malforta lumo. Ni surgenuis kaj komencis rampi antaŭen, kaj alvenis al malfermita pordo.

Kaj jen, tie estis mia instruisto, Fraŭlino Martin. Kaj la lernejestro S-ro Gillespie. Kaj la instruisto de mia fratino, S-ino Machens . . . kaj ĉiu instruisto en la lernejo. Sed ili staris tie, senmove, kiel statuoj. Kaj du homoj "prilaboris" ilin, jen ĉio kion mi povas klarigi--ili metis cirkvitojn, interŝanĝis bateriojn, ĝustigis okulojn, lubrikis artikojn. La instruistoj, ĉiuj, estas robotoj! Mia koro ekbatis, mia buŝo sekigis, miaj kruroj ekstremis, kaj mi silente kaptis la manon de mia fratino, kiu same staris en kompleta ŝoko, kaj ni silente glitis malantaŭen, supren, porden, eksteren, kaj for.

Mi estis dum kelkaj tagoj apenaŭ kohera. Mi konfuziĝis, timis, sentis min freneza, ne kapablis paroli al iu ajn. La sekvan semajnon ni havis ekzamenon en la klaso, kaj mi eĉ ne sciis kiel respondi. Kiam Fraŭlino Martin redonis al mi mian paperon, kun granda, ruĝa "F", mi senpense diris "Senkompata!"

Kaj Fraŭlino Martin klinis sin al mi, kaj flustris, "Nu, knabo, vi kaj via fratino ja bone scias ke mi estas senkora, ĉu ne?" Kaj ŝi ridetis, milde karesis mian kapon, kaj preterpasis.

Mia sango frostis. Kaj ĝi restas frosta. Neniun mi povas fidi, neniun mi povas alparoli. Mi ne povas kompreni, kial estas tiel. Sed mi ĵuras, ke kiam mi estos maljunulo, kaj mi havos proprajn genepojn, mi certe al ili diros pli ol “Ne zorgu. Tie estas nenio”.

Persistemo

Iam estis knabo kiu deziris lerni Esperanton.

“Esperanto ne estas vera lingvo”, diris Paĉjo. Sed la knabo persistis.

“Neniu parolas Esperanton”, diris Panjo. Sed la knabo persistis.

La pli aĝa fratino, kiu ĵus ŝampuis la hararon, diris, “Tio vere estas stulta ideo.”

Sed la knabo persistis.

Kaj per Duolingo li ege bone lernis Esperanton.

En la tago de la Zombia Apokalipso, Paĉjo estis manĝita unue.

Panjo estis la dua viktimo.

Kaj la Zombioj manĝis la pli aĝan fratinton tuj post kiam ŝi ŝampuis la hararon.

La knabo kaŭris en angulo de sia ĉambro, kaj atendis sian sorton.

Alproksimiĝis Zombio, kaj la knabo kriis “Helpu min! Savu min!”

La Zombio haltis, rigardis la knabon, kaj diris “Ho! Esperanto estas la lingvo de la Zombia Hordo. Vi estas nia frato!”

Kaj la knabo iĝis ĉefo de la Zombioj, kaj neniam plu devis viziti la lernejon.

...

Neniam permesu ke iu ajn diru al vi, ke Esperanto ne havas utilon.

Kantado

Mi kutime ĉiam kantis gaje en la duŝejo, ĉar mi amas la varman akvon kaj la forigon de la tagaj malpuraĵoj.

“En kaverno en kanjono
Laborante je la min’,
Estis patro, vere mastro,
De filino Klementin’. “ . . . ktp ktp

Unu vesperon mi enpaŝis la duŝejon, ŝaltis la akvon, kaj ekkantis. Sed tuj mi aŭdis etan, alttonan voĉon, kiu klare diris “Ĉit!” Mi elmetis la kapon el la duŝejo, ĉirkaŭrigardis en la banĉambro, neniu ĉeestis. “La vento”, mi pensis, kaj reekkantis:

“Mia kara, mia kara
Mia kara Klementin’,
Vi perdiĝis nun ĉiame,
Bedaŭrinde Klementin’.”

Sed ĉi-foje la “ĈIT!” estas multe pli laŭta, venis el la regiono de miaj malsekaj piedoj, kaj kiam mi rigardis la truon al la elfluejo, el ĝi grimpis eta . . . nu . . . hmm . . . ne homo, certe, nek insekto, nek reptiliano . . . nu, mi diru “estaĵo”, kiu svingis la manojn kaj kriĉis.

“Ni, kiuj loĝas sube, ŝatas la akvon, kaj eĉ la sapo estas utila por la purigado de niaj subaj vilaĝoj, sed ni ne kantas, ni ne ŝatas kantadon, kaj ni ne plu povas ĝin toleri! Mi ne menciuj, ke vi ne aparte bone kantas! Okazis voĉdonado, kaj mi venas por informi vin ke VI NE KANTU PLU EN LA DUŜEJO!”

Mi estas materialisto. Tion, kion mi vidas antaŭ miaj okuloj, mi akceptas. Eta estaĵo, el mia elfluejo, kiu alparolas min . . . eksterordinara afero, sed jen ĝi, do . . .

“Pardonu, eta estaĵo . . .” mi diris. Sed la “eta estaĵo” tuj interrompis:

“Mi estas Frm, el la Familio Frn, el la Popolo Frg, el la Suba Popolaro.”

“Nu, bone” mi diris. “Sed tiu ĉi estas mia duŝejo, en mia domo, kaj mi kredas ke mi havas la rajton kanti en ĝi se mi volas.”

Ĝi fiksrigardis min. “Mi kaj miaj geavoj kaj prageavoj loĝis sube dum jarmiloj. Kiam precize estis konstruita via domo?”

“Hmm, antaŭ dek jaroj, pli-malpli”.

Ĝi--Frm--krucigis la brakojn, denove fiksrigardis min, kaj diris “Jen, do?”

Ekde tiu tago mi ne plu kantas en la duŝejo.

Sed mi ĵuras ke hieraŭ, kiam mi enpaŝis por duŝi min, antaŭ ol ŝalti la akvon mi aŭdis etajn, alttonajn voĉojn el suba, fora distanco, kiuj kantis “En kavernoj, en kanjono . . .”

La Vojaĝo

Nu, mi konfesas. Mi ja estas tia. Kia? Vi baldaŭ vidos.

Ĉi tagon mi ne havis iujn gravajn devojn, kaj mi decidis ekskursi aŭte en la kampara regiono ĉirkaŭ nia urbo. Estas multaj ĉarmaj urbetoj, grandaj kaj malgrandaj bienoj, belaj pejzaĝoj . . . Do, mi ekaŭtis por ĝui la vidindaĵojn.

Mi alvenis al iu krucvojo, kaj tie dekstre estis mallarĝa vojo, ŝirmita de arboj kaj arbustoj, kaj apude estis granda ŝildo sur kiu estis skribita “NE LAŬIRU TIUN ĈI VOJON”.

Do, mi laŭiris la vojon.

Mi alvenis post kelkaj kilometroj al granda bien-stila pordego, fermita sed ne ŝlosita. Sur ĝi pendis dua ŝildo, sur kiu estis skribita “NE TRAPASU TIUN ĈI PORDEGON”.

Do, mi trapasis ĝin.

Tie estis eĉ pli mallarĝa vojeto, kiu serpentumis pluen. Mi aŭtis antaŭen eble du aŭ tri kilometrojn kaj alvenis al granda malnova domo, farbita, izolita, sed ne vere tiom minaca. Mi parkis la aŭton, eliris, kaj paŝis al la pordo. Tie estis tria ŝildo, sur kiu estis skribita “NENIEL ENVENU”.

Do, mi eniris.

Mi trovis min en malnovstila salono, kvazaŭ el la epoko de 1910, pli-malpli. Ĉio estis en bona stato, klare prizorgata. Tiu ĉi ne estis ia forlasita domaĉo. Mi paŝis en duan similan ĉambro, kaj tie estis fermita pordo, sur kiu estis kvara ŝildo, kun la vortoj “NE MALFERMU TIUN ĈI PORDON”.

Do, mi malfermis ĝin.

Jen ŝtuparo al iu suba etaĝo, kaj mi malsupreniris. Tipe Usona subtera etaĝo, nenio estis rimarkinda aŭ stranga. Sed je la fora flanko de la granda ĉambro estis alia pordo, kun kvina ŝildo, sur kiu mi legis “VI NE ESTAS BONVENA. NEK FRAPU, NEK PETU PERMESON ENVENI, NEK ENVENU SEN INVITO.”

Do . . . mi frapis, diris “Ĉu mi rajtas enveni?” kaj malfermis la pordon kaj enpaŝis.

Tie . . . antaŭ miaj okuloj . . . ĉe granda skribotablo sidis maljunega kalva viro, kun longa blanka barbo, kiu skribis permane sur diversaj folioj. Ĉirkaŭ li estis stakoj da libroj--inter ili mi rekonis PIV-on, PAG-on, la Belgan Antologion, la Fundamentan Krestomation, kaj La Grandan Kaldronon. La oldulo ekkonsciis pri mia ĉeesto, ĉesis skribi, malrapide turnis sin al mi, rigardis min, levis unu fingron kaj diris “NE ALPAROLU MIN!”

Do mi diris “Saluton.”

Regis silento en la ĉambro momente.

Kaj li ekbalbutis, “Sed . . . sed . . . ho . . . sed . . . Vi parolis al mi en Esperanto!”

“Certe”, mi diris.

“Mi estas maljunega!” li kriis. “Mi lernis Esperanton la tutan vivon! Mi amas la lingvon! Ĝi estas mia koro, mia vivo!” Paŭzo. “Sed . . . mi neniam certis, neniam sciis, ĉu iu efektive parolas ĝin. Dum jaroj mi scivolis! Kaj nun, jen vi!” Paŭzo. “KIAL DIABLE NENIAM ANTAŬE VIZITIS MIN ALIAJ ESPERANTISTOJ?”

Ankaŭ mi devis grati la kapon pro tiu mistero.

Kiel Servi Homojn

Ni baldaŭ havos novajn najbarojn.

La malnovaj foriris antaŭ kelkaj semajnoj, kaj la domo sidis senhoma ekde tiam. Mi tre ŝatis la malnovajn . . . kaj mi estas kontenta, ĉar mi scias ke ili foriris kun multaj informiloj kaj lerniloj pri Esperanto. Preskaŭ ĉiutage mi trovis okazon por plenumi mian devon al la Verda Celo.

Pluraj homoj venis kaj rigardis la domon, por decidi ĉu eble ili ŝatus lui ĝin. Mi ĉiam atentis la situacion, kaj kiam ajn aperis aŭto mi surmetis mian verdan jakon, prenis miajn varbilojn, kaj amike paŝis tien al la apuda vojeto. Homoj estas tiel malfermaj al tiaj kontaktoj! Estas mirinde, vere. Ili ĉiam ridetas, manpremas, kapjesas, kaj volonte prenas mian materialon. Ial lastfoje kiam mi komencis priskribi mian ĝardenon--en kiu ĉio estas verda--kaj klarigi ke mi ne permesas florojn--ĉar ĈIO devus estis verda--la virino iom tro rapide perdis intereson. Komprenoble ne ĉiuj ŝatas ĝardenojn! Ŝajne, tamen, io misas pri la domo mem, ĉar neniu el tiuj revenis.

Sed ĉi-foje venis iu luonto de la domo kiam mi estis for. Malbenu la sorton! Mi pli zorge aranĝu mian ĉiutagan horaron . . . kaj ŝajne eĉ sen scio pri la granda ĝojo kiu atendas ilin, ili akceptis la domon kaj subskribis kontrakton. Juna paro, kun dekdujaraĝa filo, la perfekta aĝo por bone lerni la Internacian Lingvon.

Pro tio ke mi maltrafis ilin, mi faros ion grandiozan por bonvenigi ilin al la nova hejmo. Mi jam iom kaŝe, por doni surprizon, metis verdajn glumarkojn sur ĉiun fenestron, kun la vizaĝo de Zamenhof kaj la senpaga telefonnumero al la Landa Asocio. El la malantaŭa ĝardeno mi forigis ĉiujn florojn, tiel ke ili povos trankvile vidi verdon ĉie. Kaj mi muntis tie etan ekspozicion, kun Esperanta flago, diversaj ŝildoj kun gravaj frazoj ("Inteligenta persono facile lernas Esperanton" . . . "Venu la Verda Venk" . . . "Unu Lingvo, Unu Mondo"). Mi eĉ metis tien etan statuon de La Majstro.

Pinte, kiam ili alvenos kaj unuafoje malfermos la pordon, ekludiĝos per sekreta son-sistemo La Himno, kaj ili tuj konatiĝos kun la gloraj vortoj "En la mondon venis nova sento . . ."

Mi saltetas en la seĝo pro feliĉo, Samideanoj. Kia plezuro, ke en la vivo oni povas tiumaniere servi aliajn homojn.

Kiel Solvi Problemojn

Iam estis reĝlando en kiu la Reĝo ne estis . . . nu, mi diru ke li ne estis la plej luma ampolo en la lampo. Sed li estis tre afabla, kaj la loĝantoj vere amis lin. Li havis bonan konsiliston, lerta knabo kiu nomiĝis Ĵak, kaj li tre amis hundidojn kaj katidojn.

Sed la Reĝo estis malfeliĉa, pro tio ke li ne havis edzino-Reĝinon, nek filo-Princon, nek filino-Princino. (Eble mi menciu ke la Reĝo ne estis la plej belaspekta pomo en la korbo).

Krom tio, estis drakoj en la montoj ĉirkaŭ la reĝlando, kaj la loĝantoj komencis maltrankviliĝi pro la danĝero.

La Reĝo vokis Ĵakon, kaj diris, "Mankas Reĝino, mankas Princo, mankas Princino, kaj la drakoj en la montoj minacas. Kion mi faru?"

Ĵak pripensis kaj diris "Pli gravas ke la infanoj en la vilaĝoj ne plu estu manĝitaj de la drakoj, ol ke vi havu edzinon. Ni sendu alvokon por Heroo, kiu povos veni kaj venki la drakojn. Poste ni alfrontos la pli malfacilan problemon."

Do, alvoko eliris el la reĝlando, kaj iun tagon aperis mistera kavaliro, sur granda blanka ĉevalo, kiu portis longegan lancon, kaj kiu sen eĉ unu vorto forgalopis en la montojn. De la valoj oni povis vidi flamojn, aŭdi minacajn kriojn kaj blekojn, kaj post kelka tempo ĉio silentiĝis.

Revenis la kavaliro, kiu aperis antaŭ la Reĝo. (La Reĝo dum la batalo kaŝis sin malantaŭ la trono kaj ludis kun siaj hundidoj kaj katidoj).

Post demeto de la kasko, ĉiuj gapis kaj miris. La kavaliro estis . . . belega virino!

Ĵak rigardis ŝin, rigardis la Reĝon, kaj tute feliĉis, ĉar jen la solvo al la dua problemo.

Oni sendis la Reĝon al fora kastelo, kie li feliĉe okupiĝis pri la dorlotbestoj. Ĵak kaj la kavaliro geedziĝis, Ĵak nomis sin la nova Reĝo, kaj paco kaj trankvilo plenigis la regnon dum multaj jaroj.

La Reĝino en la Alta Turo

La Reĝino Amindamina estis malfeliĉa, ĉar la Reĝon Egloflufindo ŝi malamamis ĝis la profundo de sia koro. Kaj la afero estis pli ol kutime tikla, ĉar en infanaĝo feino vizitis la reĝon kaj per sorĉado imunigis lin kontraŭ ĉiuj kutimaj danĝeroj kaj minacoj. Kugloj ne povis tuŝi lin, tranĉiloj ne povis tranĉi aŭ piki lin, eĉ akvo ne povis dronigi lin. Pli ol unufoje La Reĝino Amindamina blasfemis pro tiu malbenita feino, kiu tiom komplikis ŝian vivon.

Finfine, post interkonsiliĝo kun la plej lertaj majstroj de la plej malhelaj artoj, ŝi komencis pretigi tre potencon venenon, kiu, diris la malhelaj majstroj, kapablas penetri ĝis la ostomedolo kaj eĉ ĝis la ungoj de la plej etaj piedfingroj, kaj mortigi la Reĝon Egloflufindo malgraŭ la sorĉado, kaj sen eĉ spuro de ties agado post la mortiga efiko.

Ŝi eklaboris en la plej alta ĉambreto de la plej alta turo de la kastelo, kien ŝi iris, ŝi diris al ĉiuj, por ŝpini, kanti, kaj mediti. Kelkaj en la kastelo scivolis pri la nigraj fumonuboj kiuj flosis el la altegaj fenestroj, kaj kelkaj plendis pri la akraj odoroj kiuj plenigis la aeron ĉirkaŭe, kaj oni rimarkis mortintajn ŝafojn kaj paserojn en la apudaj kampoj . . . sed kion fari.

Post longaj miksado, kirlado, boligado, filtrado, provado (ho, la kompatindaj musoj kaj vespertoj!), pli(mal)bonigado, ktp, la nova veneno estis preta. Ek, do! Unue veneni la supon, due per la supo veneni la Reĝon Egloflufindo, kaj trie vivi en feliĉa libero ĝis la fino de la natura vivo.

La Reĝino Amindamina zorge metis la venenon en grandan bovlon, tenis ĝin zorge per ambaŭ manoj, kaj eliris sian etan altegan ĉambron cele al la formala manĝosalono. Sed ŝi ne rimarkis flakon de ŝlimo sur la unua ŝtupo (ŝajne tien ŝi ĵetis la kompatindajn muso-kobajojn), kaj je la unua paŝo ŝi glitis, perdis la ekvilibron, kaj falis el la turopinto ĝis la teretaĝa korto.

“Strangege”, diris al si la Reĝo Egloflufindo post la enteriga ceremonio. “Eĉ sen ajna peno mi liberiĝis, kaj povas nun vivi feliĉa ĝis la fino de la natura vivo.”

Orharulino: La Vera Rakonto

Iam estis junulino kiu nomiĝis Orharulino.

Iun tagon dum promenado en la arbaro, ŝi alvenis al dometo. Ŝi frapis la pordon, sed neniu respondis, kaj pro tio ke ŝi estis aŭdaca kaj iom malbonkondata ŝi malfermis la pordon kaj eniris.

Ŝi manĝis la manĝaĵojn en la kuirejo, akcidente rompis seĝon en la salono, kaj poste treege laciĝis kaj en unu el tri litoj endormiĝis.

Venis la posedantoj de la domo, tri ursoj. Ili envenis, kaj rimarkis la malpuran kuirejon, la rompitan seĝon, kaj finfine ili malkovris la dormantan knabinon en la lito.

“Kion ni faru?” diris Paĉjo Urso.

“Ni voku la policon!” diris Panjo Urso.

“Ni manĝu ŝin!” diris la filo.

“Sed ni ne havas telefonon!” grumblis Paĉjo Urso.

“Ho, jen problemeto” konsentis Panjo Urso.

“Eble oni arestus nin, se ni manĝus ŝin” diris la filo.

Ili cerbumis.

Kaj cerbumis.

Kaj cerbumis.

“Mi soifas”, diris Paĉjo Urso.

“Ankaŭ mi”, diris Panjo Urso.

“Ankaŭ mi”, diris la filo.

Do ili sidiĝis kaj komencis trinki bieron, glason post glaso. Trinkis kaj trinkis kaj trinkis . . .

Kiam Orharulino finfine vekigis, ŝi trovis la Tri Ursojn tute ebriaj kaj senkonsciaj sur la planko. Ŝi zorge prenis la monujojn de ĉiu, ŝtelis oran ringon de Panjo, kiu ricevis ĝin de la praavino-urso, kaj gaje promenis hejmen. La gepatroj tre feliĉis pri la “rikolto”.

Kiam urso trinkas bieron, ŝtelisto havu fieron.

Kio Okazis pri la Drakoj

Post “La Granda Batalo” en kiu la Mistera Virina Kavaliro venkis la drakojn kaj iĝis la Reĝino de la tuta lando, la bestegoj mizere trenis sin trans la montaron kaj ekserĉis novajn vivojn.

Kelkaj trovis bonajn postenojn en diversaj registaroj kaj universitatoj kie “varma aero” estas ofte pli grava ol saĝo.

Kelkaj migris al Sovetio, kie ili facile laboris en la grandaj uzinoj por fari ŝtalon kaj konstrui novan socion.

Unu eĉ iris al la okcidento de Usono kaj trovis komfortan loĝejon sub la parko “Yellowstone”, kie li foje kaj fidele, kvankam nun olda, blovas varmegan vaporon el truo super sia kaverno.

Unu aŭ du trovis novajn regnojn en kiuj abundis gejunuloj . . . nu, pri tio eble ni ne parolu.

Sed unu paŝis longe tra la najbara lando, kaj finfine alvenis al eta, fora vilaĝo, kie la homoj ne multe sciis pri la “granda mondo” kaj kie oni akceptis lin kiel “unu el ni”.

Li komencis vesti sin kiel homo, eĉ kun kravato kaj ŝika ĉapelo, kaj post iom da esplorado malfermis sian propran bakejon, kiu iĝis treege sukcesa entrepreno. Antaŭe ne estis bakejo en la vilaĝo, sed nun la avinoj povus aĉeti bonan panon kaj ne labori tuttage en sia varma kuirejo.

Li eĉ dum kelkaj jaroj estis estraro de la loka lernejo, kaj ĉiam disdonis kukojn al la aliaj estraranoj.

Sed iun tagon venis vojaĝanto el la “granda mondo” por viziti sian praonklinon. Li promenis tra la vilaĝo, kaj malsata eniris la bakejon por aĉeti kuketon.

Li rigardis la bakiston, paliĝis, kaj tuj elkuris al la strato kie li kriis “Helpon! Helpon! Via bakisto estas drako!”

La vilaĝanoj ekkonsterniĝis, prenis forkegojn kaj trabojn, kaj forpelis la kompatindan drakon el la vilaĝo.

Sur la fermita bakejo, oni muntis ŝildon kun la vortoj: “Tie ĉi vivis ne homo, sed drako kiu ŝajnis sin homo.
DRAK-ULO!”

Post jaroj nur restis la vortoj “Tie ĉi vivis . . . DRAK ULO” kaj la vilaĝo iĝis riĉa kaj fama pro la multaj gastoj kiuj venis por vidi la lokon.

Freŝaj Piroj

Iam, en la foraj oraj tagoj, kiam la infanoj gaje ludis en la kampoj kun la bovoj kaj Ivy Kellerman verkis lernolibrojn, kiam mankis Interreto kaj poŝtelefonoj kaj la vivo estis simpla kaj plaĉa kaj bona . . .

Mia onklino Katrina, kun sia plej bona amikino Feliŝa, decidis veturi al la proksima vilaĝo por aĉeti freŝajn pirojn.

Ili vokis Aleksandron, la ĉevaliston de la bieno, kaj petis lin jungi la ĉevalojn al la kaleŝo por la vojaĝo. La vilaĝo estis 10 mejlojn for, kaj ili pakis piknikon por manĝi dumvojaĝe, pro tio ke ili bezonos tutan tagon por la aventuro.

Do ek! Laŭ la kamparaj vojoj, preter bienoj kaj laĝetoj, jen bovoj, jen porkoj, jen tritiko, jen maizo, jen la eteta vilaĝo sen vendejo de piroj, jen la flanko vojo al la valo . . .

Baldaŭ ili vidis ŝildon, manskribitan, flanke de la vojo. "Piroj. Ni havas la plej bonajn. Plej freŝajn. Venu ĉi tien". Kun sago, kiu indikis direkton al mallarĝa vojeto dekstren.

"Ni iru tien, kaj vidu, ĉu tio estos pli oportuna ol la pli longa veturado en la vilaĝon!" diris mia onklino Katrina. "En ordo", diris ŝia plej bona amikino Feliŝa, kies vizaĝo, por honeste diri, pli similis al sekigita pruno ol amikino.

La vojeto estis sufiĉe malglata kaj kruta, sed klare ĉirkaŭ ĝi estis pirarboj kaj bele prizorgataj kampoj. La ĉevaloj bone laboris kaj la kaleŝo antaŭeniris.

Sed subite, katastrofo! Kurbiĝo de la vojeto, valo flanke, stumblado de ĉevalo, kaj HO VE: la kaleŝo, la ĉevaloj, la onklino, kaj la amikino glitis dekliven kaj malaperis en nubon de polvo kaj rokoj.

Ili serĉis pirejon. Ili trovis nur pereon.

Kaj la bela bongusta pikniko estis tute perdita.

Matena Gasto

Trinkante mian teon ĉi-matene -- PG Tips, kompreneble, jen bona brita teo, forta kaj nigra -- mi masuprenrigardis hazarde, kaj el sub la librobretaro aperis la kapo de granda, helbruna lacerto. (Mi menciis, ke mi trinkas mian teon sen lakto, sen sukero, el taso de la firmao "Denby").

"Nu . . ." diris la lacerto.

Mi estas neperturbecbla, kaj pro tio ke "Nu" estas nek demando nek aserto, mi diris nenion. Absurde, ĉu ne, diri "Nu . . ." kaj poste nenion?

Post kelkaj minutoj, la lacerto diris "Mi havas demandon."

"Bone", mi respondis. "Jen tute kohera frazo, eĉ kun ĝusta uzado de la akuzativo. Gratulon."

"Kiom estas la distanco de la tero ĝis la luno?" diris la lacerto.

Diable.

"200,000-iom da mejloj, laŭ mia memoro", mi konjektis.

"Prefere diru pli precize" respondis la lacerto.

"Momenton, lacerto. Mi kontrolos pere de Google . . . jen, la distanco de la tero ĝis la luno estas 238,900 mejloj. Mi ne tiom malbone memoris."

"Prefere diru la distancon en kilometroj, mi petas", diris la lacerto.

"Ho, sankta . . ." Ni supozu ke mi diris "bovino", kvankam eble mi diris ion pli fortan. "Mi estas Usonano. Mi apenaŭ scias kio estas kilometro!"

"Tamen . . ." diris la lacerto.

"Bone, bone, momenton . . . ek al Google denove . . . 384,472 kilometrojn for estas la luno, averaĝe."

"Ho, dankon" diris la lacerto. "Nun mi reiru al mia malluma, malseka ŝirmejo malantaŭ la ekstera muro de la domo."

"Momenton!" mi kriis. "Neniu rajtas interrompi mian laboron tiel, tute sencele, sen ia klarigo! Kvankam ja estas notinda via bona regado de Esperanto. Kial je Zamenhof vi ĝuste nun devis enketi pri tia mezuro?"

"Ĉu ne estas memevidente?" respondis mia gasto. "En mia vivo mi ĉiam okupiĝas pri laCERTO".

Nerefutebla respondo.

La Tragika Rakonto pri Sam kaj Tim

Unu tagon Sam kaj Tim gaje promenis laŭ la pado de la vilaĝo ĝis la proksima kermeso. La gepatroj de ambaŭ infanoj donis al ili kelkajn ŝilingojn kaj forsendis ilin por amuziĝi tie la tutan tagon. Estis kompreneble sekure, ĉar en la regiono ne plu troviĝis drakoj, aŭ troloj, aŭ ursoj, aŭ sorĉistinoj. Almenaŭ laŭdire ne . . . tiaj aferoj ne povas ekzisti samepoke kun poŝtelefonoj kaj komputiloj . . . ĉu ne?

Sam kaj Tim estis bonegaj amikoj, kaj dum ili paŝadis kermesen, ili babilis senĉese. Kaj ili komencis preparoli siajn aliajn amikojn. “Ho, la alia Tim, li vere estas dikulo, ĉu ne?” “Tiu Liĉjo, li ĉiam provas ŝerci, ĉiam malsukcese”. “Kaj Margo . . . ŝi ĉiam taksas sin tiel inteligenta”. “Ĉu vi scias, kiom da katoj Benson havas hejme?” Kaj tiel plu.

Kion ili ne rimarkis, ŝajne, estis ke post ĉiu tia komento, la ĉielo iomete malheliĝis, komencis aperi grizaj nuboj, ekblovigis siblanta venteto el la arbaro, kaj en la forfora distanco aŭdiĝis muĝoj kaj blekoj de iuj bestoj.

Efektive la vojeto al la kermeso iris preter bosko, en kiu estis kaduka domaĉo multajn jarojn ne enloĝata, sed kie en antikvaj tempoj loĝis sorĉistino. Super rivereto per ŝtona ponto, sub kiu en antikvaj tempoj estis terura, granda trolo. Proksime al kaverno en montento, kie en antikvaj tempoj nestis drakoj. Kaj tra veprejo kie iam estis ursoj, antaŭ la alveno de homoj.

Vigle klaĉante Tim kaj Sam proksimiĝis al la bosko, kaj rimarkis ke ĝi estis riparita kaj ŝajne estis fajro en la kameno. Tuj elvenis malbela, maljuna sorĉistino, tute nigre vestita. “Junaj klaĉemuloj! Neindaj etuloj! Mi ŝanĝos vin en ranojn!” “Ne, ne!” kriis Tim kaj Sam. “Ni ne plu klaĉos, ni promesas!”

“Unufoje mi permesas ke vi restu homoj, sed ekde nun vi ĉiu havos grandan verukon sur la nazo!” Kaj aperis granda, ruĝa veruko sur la du nazoj.

“Kia malbela virinaĉo” plendis la infanoj dum ili pluiris. Ili preskaŭ atingis la ponton, kiam elgrimis enorma, fortika, grimacanta trolo. “Klaĉantaj buboj!” li kriis. “Mi pistos vin al faruno, por baki mian panon!” “Ne, ne!” kriis Tim kaj Sam. “Ne pistu nin! Ni ne plu klaĉos! Ni promesas!”

“Ĉi-foje mi ne vin pistos” diris la trolo. “Sed ekde nun la odoro el viaj buŝoj estos kiel mia, haladza kaj naŭza”. Kaj tuj ili komencis elspiri teruran buŝodoron.

“Kia misformita estaĵo!” plendis Tim kaj Sam. Ili paŝis kaj plendis, kiam alflugis drako el la apuda kaverno. “Malagrablaj bestetoj dupiedaj!” diris la drako. “Mi bruligos vin por nutri mian fajron!” “Ne, ne” kriis Tim kaj Sam. “Ni estos pli bonkondutaj! Ni promesas!”

“Vi ricevos unu komplezon de mi. Mi ne bruligos vin, sed ekde nun vi sentos vin varmegaj, kaj konstante ŝvitos”. Kaj grandaj ŝvitgutoj komencis fali desur la verukhavaj nazoj de la kompatinda paro.

Ili pluiris, kaj jam vidis la kermeson, kiam el la veprejo aperis grandega urso. Ĝi rigardis ilin, snufis ilin, kaj diris “Ho, kiaj malbelaj, malagrablaj infanoj! Mi manĝos vin!” Kaj li manĝis ilin preskaŭ unuglute.

Sed pro la haladza odoro en la buŝoj, la kompatinda urso suferis pro dispepsio plurajn semajnojn, kaj ĵuris ke li neniam denove manĝos infanojn.

La Postmorta Esperanto

La animo de la dolĉa, malforta virineto forlasis la karnon sur la lito, kaj pasis en la malhelan, nebulan, nekonatan miasmon de tio, kio ekzistas post la morto .

Tie staris aparato, kiu iom similis al bank-aŭtomato, kun malhele lumanta verda tuŝ-ekrano kaj la vortoj "TUŜU ĈI TIE POR KOMENCI".

Ŝi tuŝis la ekranon. "BONVOLU ENTAJPI VIAN NOMON; FININTE, PREMU 'ENIGI'". Ŝi faris. M-a-r-i-a-n-a E-v-e-n-s-o-n.

"BONVOLU ENTAJPI LA DATON DE VIA MORTO; FININTE, PREMU 'ENIGI'".

Je tio ŝi tute hezitis. Ŝi kuŝis malsana tiom longe, kaj iom perdis konscion pri tagoj kaj datoj.

"SE VI NE ENMETOS LA PETITAN INFORMON, VI NE POVAS ANTAŬENIRI", indikis la ekranon.

Ŝi ekploris. Sed tuj regis sin, kaj entajpis "Mi ne scias la dato de la morto".

"MANKO DE AKUZATIVO ESTAS NOTITA!" aperis sur la ekranon. "ĈU VI INTENCAS ANTAŬENIRI, AŬ NE?"

Singultvoĉe, ŝi kriis en la miasmon "Ho ve, mi pardonpetas. Mi estas konfuzigita pro la mortobato kaj pro la apero en nekonata loko . . . "

Kaj sur la ekranon eklumis "MALĜUSTA UZADO DE -IG- KUN TRANSITIVA VERBO. VIA KAZO NE ESTAS TRE ESPERIGA."

Ŝi mordetis la malsupran lipon. Larmoj fluis el la ĵus-mortintaj okuloj. Ŝi ja estis instruisto de Esperanto, eĉ posedis diplomon C1. Ŝi kapablas je pli bona, eĉ postmorte.

Ŝi rektiĝis, kaj zorge, penseme entajpis: "Mi estas Mariana Evenson. Mi ŝajne ĵus mortis. Mi longe malsanis, kaj ne certas pri la dato de la morto. Mi supozas ke tio okazis hodiaŭe." Kaj premis 'ENIGI'.

"HODIAŬE? HODIAŬE? KIO ESTAS HODIAŬE? ĈU VI MORTIS HODIAŬ--PUNKTO FINO-- AŬ NE?"

"Ho, mi estas perdita" pensis al si Mariana. "Mi provu unufoje pli. Se mia kapo nur ne estus tiel skuita. Eĉ malsana mi legis librojn en Esperanto . . . mi kapablas fari pli bone."

"ONI ATENDAS" palpebrumis la ekranon.

Zorge, intense, Mariana komencis entajpi. "Mi nenion ajn scias pri tiu ĉi loko, kie mi troviĝas nun. Mi estas diplomita instruisto de Esperanto, kaj mi longe malsanis pro kontaĝa malsano kiu devigis min izoliĝi. Mi mortis iam, tre lastatempe, kaj nun staras nescia kion fari. Mi provas respondi ĝuste."

La ekranon brilis pli lume ol antaŭe. Aperis mesaĝo: "DIPLOMITA INSTRUISTO ĈIAM KONSCIU PRI LA SIGNIFOJ DE 'PROVI', 'STREBI', KAJ 'KLOPODI'. NI HAVAS DUBOJN PRI VIAJ ASERTOJ."

Mariana legis. Malespero trakuris ŝin. Larmoj fluis denove. Preskaŭ svenante, ŝi kriis "Diable!"

"Jes?" diris voĉo apuda.

La Geko

Nia domo situas en valetio. "Sciuro-Valetio", oni nomas ĝin, kvankam mi neniam vidis sciuron ĉi tie. Proksima strato nomiĝas "Burdo-Strato", kaj mi ja vidis burdojn. Alia proksima strato nomiĝas "Malgranda Cervo" kaj eĉ tiujn bestojn mi vidis. Sed sciurojn, ne. Tamen, tio ne havas rilaton al mia rakonto.

Kiel vi bone scias, ni ja havas lacertojn. Pli precize, troviĝas ĥameleonoj (sed ne kamel-leonoj!), kiuj aktivas tage, kaj montras sin aŭ verde aŭ brune, depende de la fono. Ili ŝatas sunumi sin sur la arbustoj, aŭ sur la betona fundamento de la domo.

Kaj troviĝas gekoj, kiuj aktivas nokte. Ili estas palaj, misteraj, kremkoloraj bestetoj kun brunaj makuloj. Lastatempe multaj junaj gekoj aperis, kaj foje ili transkuras la plankon de la porĉo; sed la plenkreskaj ŝatas sidi alte, proksime al la plafono, kie ili povas trovi sukajn insektojn.

Mi ŝatas, vespere, eliri al la porĉo kaj sidiĝi en la mallumo por konversacii kun ili. Malgraŭ la etaj kapoj kun etaj cerboj ili havas sian saĝon, kaj ĝenerale estas amikemaj. Ili ne multe okupiĝas pri la aferoj de la pli granda mondo, sed ili ŝatas babili pri la vetero, pri la diversaj tineoj en la dieto, kaj pri la minacoj de birdoj, serpentoj, didelfoj, kaj aliaj estaĵoj de la iom ŝlima, malhela, malseka spaco kiun ili enloĝas. Ili ne ŝatis, ekzemple, kiam paro de hirundoj konstruis neston tre proksime kaj tie edukis kvar etajn birdidojn.

Sed antaŭ kelkaj tagoj mi rimarkis perturbon. Mi sidiĝis en mian seĝon kaj salutis ilin . . . sen respondo. Mi ĉirkaŭrigardis, kaj vidis neniun gekon. Nekutime. Sed foje ili ne aperas, aparte se estas tre varme.

Post kelkaj minutoj aperis unu geko sur la muro. "Ho . . ." ĝi diris.

"Saluton, geko", mi respondis. "Kial vi ĉiuj forestas? Kio okazas?"

"Nu", ĝi murmuris. "Ni maltrankviliĝas. Kaj plejparte ni elektas resti en nia ŝlimejo, ĉar tie estas plej komforte".

"Maltrankviliĝas? Kial?" mi enketis.

"Hmm" softe voĉis la geko. "Mi ne certas, ĉu mi diru. Sed vi estas amiko, kaj eble vi sciu".

"Bone", mi diris, kvankam mi pensis "Ho, eble malbone . . ."

"Ni estas tre antikva popolo" ĝi komencis, "kaj ni havas niajn historiojn kaj rakontojn. Inter ni estas fabelo ke ĝuste antaŭ la fino de la mondo, ni gekoj kolektiĝos kaj estos forportitaj aliloken, for de danĝero. Kompreneble neniu vere kredas, sed inter ni estas kelkaj tre tre maljunaj gekoj kiuj komencas rakonti la aferon denove. Tio timigas la junulojn, kaj ĝenas la aliajn. Sed verdire oni ne scias, ĉu ne?"

"Ha, mi komprenas", mi diris. "Multaj popoloj havas tiajn rakontojn. Mi ne multe maltrankviliĝus, ĉar kiel vi diris, neniu vere scias. Sed ŝajnas al mi tre minimume, ke estas vero en la historio".

"Nu, vi pravas" respondis la sola ĉeestanta geko. Kaj li regrimpis sub la tabulojn de la ekstera muro.

Stranga rakonto, stranga afero. Kaj egale strange estas ke, dum la pasintaj pluraj vesperoj, kiam mi eliras al la porĉo, videblas eĉ ne unu geko, granda aŭ malgranda. Estas kvazaŭ ili ĉiuj malaperis . . .

Infanoj, ignoru viajn gepatrojn kiam ili diras “Manĝu la legomojn”

Iam knabino en kampara domo
Songis nokte pri koŝmar-fantomo,
Kaj vekiginte en matena lumo
Al la patrino diris “Ho, kukumo

Giganta kiel la preĝeja turo
Ĉasis min, kun fajro kaj kun fumo.
Kaj mi min kaŝis ĉe la doma muro,
Kaj kovris min per musko kaj per humo.

Ĝi serĉis min avide, sed ne vidis
Ke sub la humo mi kaŝita ridis.
Sed mi enspiris pulvon al interno
Kaj tuj eksplodis forta, laŭta terno!”

La bona Panjo tenis ŝin en brakoj,
Kaj diris, “Mi vin ŝirmos de atakoj.
Vi restos kun mi en la dom’ sekura--
La monstro restos tute ekstermura.”

Sed tuj eksonis forta, laŭta bato
Kaj tra la muro kraŝis . . .ho, tomato
Giganta kiel la preĝeja turo.
La paro kriis, ploris pro teruro.

Tomato-suko fluis tra l' urbeto.

Polico venis por esplor-enketo.

De la patrin', knabino mankis spuro

Krom eta ostopeco--jen femuro.

Kukumojn kaj tomatojn ĉiuj manĝas.

Ilin en salato eĉ aranĝas

Tre bele sur telero sur la tablo.

Sed jen moralo de ĉi tiu fablo:

Viktimoj la legomoj sentas sin,

Kaj venĝon ili planas en la fin'.

Konsilon saĝan donas mi al homoj:

Neniam fidu vi al la legomoj.

Ekstertera Gasto

Hieraŭ mi promenis kun mia maljuna hundo iom post la vespera mallumiĝo. En Teksaso daŭre estas varme, kaj mi atendis ĝis la temperaturo falis. Mia hundo ne plu povas fari longajn promenadojn, sed li treege ŝatas eliri por flari la arbustojn, la herbaron, la trotuaron, diversajn stangojn, insektojn, kadavrojn de mortintaj ranoj, forĵetitajn manĝaĵojn, ktp. (Kelkajn aferojn kiujn li ŝatas flari mi ne mencias, pro ĝentileco). Ni ĉiam progresas ege malrapide.

Do, laŭ la strato, ĝis la stratangulo (krucvojo de la strato “Diamanta Kolombo”, stranga nomo, pro la manko de diamantoj kaj kolomboj . . .). Preter la poŝtkestojn. Kaj tie meze de la trotuaro staris eksterterano.

Eble vi tuj demandas, “Ho, Liĉjo. Kiel vi sciis ke tiu estas eksterterano? Kial vi tiel rapide juĝas? Verŝajne ĝi estis nur kvartala bubo, aŭ simile.”

Jen miaj indikoj: estaĵo sur la trotuaro . . . malalta, verdea . . . du kapoj . . . tentakloj . . . luminesko ĉirkaŭe, en malgranda spaco . . . supre flosis ia NIFO* . . . strangaj sonoj kaj vibradoj . . .

Ĉu sufiĉas?

Mi ĉiam estas kalma. Por kio bone servas ekscitiĝo aŭ panikiĝo? Cetere, mia hundo tute ne reagis. (Mi klarigu, tamen, ke li estas tre maljuna. Kaj kiam estas io pri kio li ne havis sperton, li kutime ne vidas ĝin. Ekzemple, li neniam interagis kun katoj. Kato povas paŝi rekte antaŭ lia vizaĝo, kaj li simple ne vidas ĝin, pro tio ke ĝi ne havas lokon en lia skemo de la mondo).

“Ho!” mi diris. “Pardonu! Mi preskaŭ koliziis kun vi. Vi estu pli singarda, se vi volas simple stari sur la trotuaro. En Usono oni kutime iras, ne staras.”

“Vzzzzmmm” respondis la eksterterano.

Mi scias Esperanton kaj la francan. La angla estas mia denaska lingvo. Mi lernis la germanan kaj la grekan, kaj regas la usonan signolingvon. Sed “Vzzzzmmm” vere ne havas sencon.

“Mi tute ne komprenas vin” mi diris. “Se vi volas diri ion, elektu pli klaran metodon. Mi ne celis renkonti vin. Vi nur hazarde troviĝas ĉi tie.”

La eksterterano skuis la kapojn, intermite lumis lumoj, kaj finfine ĝi diris “Kie precize mi estas?”

“Precize? Estas malfacile diri precize” mi respondis. “Sed mi povas doni ĝeneralan informon”.

Aŭdiĝis sono kiel “rrrrrr”.

“Do jen, mi provu” mi diris. “Vi estas sur la Tero, en la Sunsistemo, en regiono kiu nomiĝas ‘Teksaso’, kaj se vi interesiĝas tre proksime estas grego de Teksasaj Longkornuloj. “

Denove tiu “rrrrrr”.

“Ho, ili estas speco de bovo” mi diris, supozante ke la estaĵo petis klarigon. “Krom ili estas nenio tute proksime kio estas aparte interesa. Oni devus iri al Aŭstino por vidi pli interesajn aferojn.”

Je la mencio de “Aŭstino” la verdaj lumoj lumis pli rapide, la vibrado en al aero plifortiĝis, kaj la “rrrrrr” ŝanĝiĝis al “hoooooooo”.

La tentakloj montris al diversaj direktoj, kaj mi firme montris suden.

Eksplodo de lumo kaj fajreroj, malsupreniĝu de la NIFO*, ensuĉado de la vizitanto per longa tubo, kaj FOR! Sur la troturaro antaŭ mi restis nenio, kaj mia hundo daŭre esploris ion interesan sur la strato.

Interese, ke eĉ ekstertere estas konata la slogano “Tenu Aŭstinon Stranga”. Kaj laŭ mia taksado, neniu en la urbo eĉ rimarkos ion nenormalan pri la nova vizitanto.

*NIFO = Neidentigita Fluganta Objekto

Mia Patro

Mia patro mortis antaŭ kelkaj tagoj.

Post ĉiuj funebraĵoj, mi, la plej aĝa filo, havis la devon iri al lia malgranda domo por prizorgi la restaĵojn.

Li estis bona homo. Instruisto en la loka lernejo, kie ĉiuj vere amis lin, kie li edukis novan generacion de urbanoj, kaj poste profesoro ĉe la universitato, ĝis lia emeritiĝo antaŭ kelkaj jaroj.

Post la frua morto de mia patrino, li loĝis sola en malgranda domo en malnova kvartalo, iom urbocentre, sed en promendistanco de la universitato. Bonaj najbaroj, bela ĝardeno antaŭ la domo . . . foje li organizis la stratajn piknikojn, sed ne dum siaj lastaj jaroj. Lia sola nekutima intereso estis ke li estis adepto de Esperanto, la supozata “internacia lingvo”. Kiam mi estis knabo li vojaĝis eksterlanden kelkfoje por partopreni internaciajn eventojn, sed li diris malmulton al la familio pri la afero.

Li posedis malmulton. Mi iris al la domo, eniris, kaj ĉirkaŭrigardis. Malgranda salono kun sofo kaj kafotablo, malgranda kuirejo, tute pura kaj bone ordigita . . . malgraŭ la lasta malsano ne estis eĉ unu malpura telero en la lavkuvo. Dormoĉambro kun lito kaj komodo. Kaj la eta studĉambro kun la skribotablo kaj librobretaro. Kaj ŝranko.

Mi rigardis ĉion, tuŝetis kelkajn aferojn kiuj elvokis memorojn, kaj finfine sidiĝis en la seĝo de la studĉambro. Mi malfermis la ŝrankon, kaj tie staris malnova ligna skatolo.



Kiam mi estis infano mi vidis ĝin. Kvazaŭ aktuale mi spektas la scenon: “Ho, Paĉjo, bela skatolo!” “Jes, kara. Ĝi estas malnova. Sed ĝi ne estas por vi. Mi petas vin ne malfermi ĝin. Ĝi estas mia afero.”

Mi estis tre obeema knabo. Post tia peto ne venus en la kapon la ideo esplori la skatolon. Paĉjo diris, jen la fino. Kaj mi ja havis miajn proprajn okupojn.

Nun, tamen, venis mia vico. Iom treme, mi prenis la skatolon el la ŝranko kaj tenis ĝin sur mia sino.

Kaj mi malfermis ĝin.

Kapturniĝo. Nekompreno. Naŭzo. Vomemo.

Finaĵo 1:

En la skatolo estis . . . fingroj. Mumiaj fingroj. Kadavraj. Klare stranĉitaj. Mi ne nombris. Eble 20. Eble 30. Kaj sur ĉiu fingro edzina ringo . . . diamantoj . . . rubenoj . . . smeraldoj . . . oro.

Nigraj nuboj ĉirkaŭis min. Mi ne povis pensi. Mi apenaŭ povis spiri. Ne. Mia patro. Paĉjo. Li estis bona homo. Li ne . . .

Post longaj momentoj mi fermis la skatolon, remetis ĝin en la ŝrankon. Paŝis el la ĉambro kaj fermis la pordon. Paŝis el la domo kaj fermis, ŝlosis la pordon. Enaŭtiĝis. Stiris hejmen, apenaŭ konscie, forpuŝante ĉiajn pensojn el mia menso.

Mi alvenis al mia hejmo. Mia edzino estis ĉe la laborejo, la infanoj estis ĉe la lernejo. Mi elaŭtiĝis, kuris en la domon, kaj vomis en la necesejo.

“Trankviliĝu, homo”, mi diris al mi. “Spiru”.

Mi duonkolapsis en la seĝon de mia skribotablo. Kaj turnis mian rigardon al la ligna skatolo sur mia breto.

Finaĵo 2:

Dum kelka tempo mi simple statuiĝis. Mi rigardis, sen kompreno. Frostotremo frapis min.

Kaj mi fermis ĝin, kaj remetis ĝin sur la breton.

Mi eliris el la ĉambro, kaj fermis la pordon. Mi eliris el la domo kaj fermis kaj ŝlosis la pordon. Mi enaŭtiĝis, kaj kvazaŭ roboto stiris hejmen. Mia edzino estis ĉe la laborejo, kaj la gefiloj estis ĉe la lernejo. Mi sidiĝis ĉe mia skribotablo, kaj tenis la kapon en la manoj.

Mi neniam reiris al la domo de mia patro.

“Estis fajro proksime al la urbocentro, kaj complete forbruliĝis la domo de emerita profesoro X en Strato Y. La domo ŝajne estis neenloĝata dum kelkaj monatoj. La fajrobrigado informas ke ĉio estis detruita, ĝis la fundamento de la malnova domo. Ili konjektas ke buboj el la kvartalo ludis ĉirkaŭ la domo kaj kaŭzis la fajron. Ne estas ia ajn indiko pri krimo. La filo de Profesoro X ne respondis al niaj vokoj.”

Kaj mi daŭre turnas mian rigardon al la skatolo sur mia propra breto . . .

Amrakonto

Li amis ŝin.

Dum longa tempo, ekde la unua vido verdire, ardis amo al ŝi en lia koro. Kiel gracia kaj eleganta ŝia maniero. Kiel bela la hararo. Kiel rapide sed zorge ŝi iris kaj revenis kiam ajn ŝi preterpasis.

Li sopiris alparoli ŝin. Sed li ne faris. Estis kialoj. Lingvobariroj. Kaj la damninda afero pri raso . . . ne, ne estus eble. Nur sopiro, ne realo.

Venis tago kiam ŝi ne preterpasis, kaj poste ne preterpasis plu. Li konsciis ke ŝi iras alian vojon, havas aliajn zorgojn, propran vivon.

Sed larmis la testudo pro la leporo.

Moderna Amrakonto, kun Poŝtelefonoj

Dediĉita al El Rata kaj Majko

Anna Bishop sidis sola en la restoracio Cullman en la vilaĝa ĉefstrato. Ŝi ĵus venis de la kunsido de la loka "Verkisto-Klubo", kie Miriam Tolland, la prezidanto, pompe lekciis pri "Kiel Verki Krimnovelon". "Idiota anserino, kiu neniam sukcese publikigis ion ajn" pensis Anna.

Anna bone konis la edzon de Miriam, Timothy, ĉar ili estis studentoj ĉe la sama universitato. Sed kial li elektis tian edzinon, ŝi ne komprenis. Vatkapulino. Supereca. Kaj ŝi grandioze loĝis en la grandioza domo de familio Tolland, ĉe la alia fino de la ĉefstrato, preskaŭ videbla de la restoracio.

Anna prenis sian poŝtelefonon kaj komencis voki, sed hezitis kaj flankenmetis ĝin.

"Nu, 'Kiel Verki Krimnovelon' ... Kial ili ne petus min prelegi? Mi jam publikigis dufoje, kaj mi profesie estas krim-teknikisto." Granda suspiro. La vivo estis pli plaĉa en la urbo. Estis bonaj kialoj por la transloĝiĝo ĉi tien, kaj la laborposteno estis pli interesa--malpli da burokrataĵoj, kaj ŝi povis labori multe pli sendepende. Sed damne. La vilaĝanoj. Ili ja bezonas klerigadon.

Anna finmanĝis la kuketon kaj fintrinkis sian kafon. Ŝi ekstaris, kaj paŝis eksteren. Sed en la momento kiam ŝia piedo tuŝis la trotuaron, okazis fortega, skua eksplodo, kaj la montrofenestro de la restoracio frakasigis kaj falis sur la teron. Anna rigardis flanken, kaj vidis fajregon, ĝuste tie en la loko de la domo Tolland. Anna paliĝis, sentis fortan tremadon en la korpo, kaj timis sveni. Fumonuboj kaj fajrego. Homoj kuris en la straton por rigardi, eksonis la sirenoj de la fajrobrigadistoj, kaj estis multaj krioj. "La domo Tolland!" "Ĝi eksplodis!" "Incendio!" "Kio diable! Katastrofe!"

Anna skuis la kapon, apogis sin kontraŭ la muro de la restoracio, kaj per tremantaj manoj elprenis la poŝtelefonon kaj vokis konaton. Tuj respondis voĉo "Ho, ha lo?" "Timothy", diris Anna, "kio okazis? Ĉu vi . . .?"

"Mi ne scias", li diris. "Mi survojis hejmen kaj haltis ĉe la apuda drinkejo, kaj ĵus komencis transiri la straton al la domo kiam ĉio eksplodis. Mi ne komprenas kiel povas esti. Kaj ho ve--Miriam estis en la domo!"

"Ho, Tim!" ŝi diris, kaj lasis fali la telefonon el la mano.

Anna staris senmove, kaj apenaŭ konsciis pri la homamaso. Ĉiuj ŝajnis kiel ombroj. Pasis pluraj momentoj. "Estos mi" ŝi pensis "kiu devos esplori la scenejon, por scii ĉu krimo aŭ akcidento."

Ŝi reprenis la telefonon de la tero, kaj vokis denove. "Tim," ŝi diris kiam li respondis. "Perfekte laŭ plano. Kiel verki krimnovelon, mia kara." Kaj la poŝtelefono de Tim falis el lia mano.